

NIA PONTO

Grupo Esperantista


Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre


48005-BILBAO (Hispanio)


Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)

TTT-ejo: esperantobilbao.tk

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

 619.694.683 (Iciar)

 658.709.087 (Jesús)

 esperantobi@gmail.com

Jar-kotizoj: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.

BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

MARTO/APRILIO 2015

Nro. 103 (2/15)

ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA.

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 22 de mayo, a las 19,30 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente

Orden del día:

1. Lectura y aprobación, si procede, de las actas de las dos asambleas generales anteriores (23/05/2014 y 06/03/2015).
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos del año 2014.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2015.
4. Informaciones varias.
5. Ruegos y preguntas.

ĜENERALA KUTIMA JARKUNVENO.

Tiel kiel vi povas legi ĉi-supre, la **vendredon 22-an de majo, je la 19,30 h.**, oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon. Ni ne bezonas substreki ke la partopreno de vi ĉiuj en la decidotaj aferoj, kiuj tuŝas nian Grupon, estas ege grava.

TAGORDO:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de la protokoloj de la du lastaj kunvenoj (23/05/2014 kaj 06/03/2015).
2. Same pri la spezoj de la jaro 2014.
3. Same pri la buĝetpropono por la jaro 2015.
4. Diversaj sciigoj.
5. Proponoj kaj sugestoj.

EDUARDO LARROUY 102-JARA!



La pasintan 9-an de marto, nia amiko Eduardo Larrouy iĝis 102-jara.

Tri tagojn antaŭe ni okazigis eksterordinaran asembleon por aprobi la novan statuton de la Grupo kaj li aktive partoprenis la kunsidon. Vera ekzemplo por ni ĉiuj!

Gratulmesaĝoj alvenis el la tuta Hispanio kaj el diversaj landoj.

Ĉe UEA-Libroservo: nova verko de eŭska esperantisto.



La Libroservo de UEA informis pri nova libro de la eŭska esperantisto Aitor Arana:

Fajra amo, Aitor Arana, *Prozo tradukita*, Eŭska E-Asocio, 2015. Premiita junulara samseksam-romaneto. Prezo: 9.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo:* <http://katalogo.uea.org?inf=9150>

(*Darío Rodríguez. 27/02/2015*)

NOVA STATUTO.

Laŭ postulo de la Vaska Registaro, ni devis reskribi la statuton, kiu regas nian asocian vivon. Fakte, ne estis grandaj ŝanĝoj. Temas precipe pri adaptiĝo al unuforma formato, tiel ke ĉiuj vaskaj asocioj havu siajn statutojn skribitaj laŭ difinita ordo. La nova statuto estis unuanime aprobita en la eksterordinara kunveno de la 6-a de marto.

Pri Arizmendiarieta en "Diario Vasco".

Biografiaj notetoj pri ĉi tiu vaska esperantisto -okaze de libra eldono- en la ĵurnalo de hodiaŭ 22-03-2015.

[Ego-Ibarra proyecta editar un libro de Arizmendiarieta](#)
Diario Vasco

(*Anthony Sarm Dom. 22/03/2015*)

COMIDA PARA CELEBRAR LOS 109 AÑOS DE LA FUNDACIÓN DEL GRUPO (20/05/1906).

Ya se está convirtiendo en tradición el juntarnos por estas fechas para celebrar el aniversario de la fundación del Grupo (20 de Mayo de 1906).

Este año nos juntaremos el **sábado 23 de mayo**. Comeremos un menú del día en el restaurante "Las Tablas" de **Portugalete**, en plena calle de "El Ojillo" (el nombre oficial, aunque poco conocido, de la calle, es "Gregorio Uzquiaino"), en lo más típico de la villa jarrillera. Precio: **11,50 euros**. Continuaremos, en una agradable sobremesa, charlando con viejos conocidos. Os esperamos a todos. **No olvidéis que hay que avisar con antelación.**

ULTIMO PAGO DE LAS OBLIGACIONES.

El tiempo pasa volando y el próximo 1 de Junio tendrá lugar el 5º y último pago del dinero que generosamente prestaron diversos socios al Grupo con el fin de afrontar el gasto de instalación de un ascensor en el edificio donde se encuentra su sede.

Agradecer es poco; sin la generosidad de estas personas, probablemente, el Grupo no habría podido continuar existiendo. Entre ellas, hubo incluso quien, desde un principio entregó el dinero a fondo perdido, negándose a que se le devolviera cualquier cantidad; otros, han ido donando, año tras año, el dinero devuelto; y otros se desprendieron de ese dinero durante los últimos 5 años.

Y a la hora de los agradecimientos, no nos podemos olvidar de la **Federación Española**, que tanto nos ayudó al principio, ni, muy especialmente, de **Fundación Esperanto** que, cada año, en la medida de sus posibilidades, nos ha hecho llegar su inestimable ayuda.

Tutkore, dankon al ĉiuj, nome de la estraro.

E-ARANĜOJ 2015.

01-03 majo. 74a Hispana Kongreso. Cullera (Valencia).


25 jul-01 aŭg. 100-a UK, Universala Kongreso en Lille, Francio.

22-29 aŭg. Itala Kongreso de Esperanto - en San Benedetto del Tronto, Italio. Itala kongreso de Esperanto. Inf.: Laura Brazzabeni kongreso@esperanto.it

30 okt-01 nov. 19-a Andaluzia Kongreso de Esperanto: "Esperanto kaj Universitato". Jerez de la Frontera (Cádiz).




NOVAJ LIBROJ.



La 30an de la pasinta decembro vidis la lumon la tria libro publikigita de SATeH (SAT en Hispanio). Ĝia titolo: **Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo**. Temas pri antologio de verkoj de du hispanaj aŭtoroj: la dudekjarcenta librecana aktivulino **Federica Montseny** (1905-1994) kaj la nuntempa doktorino pri historio **Dolors Marin**. La tekstojn kompilis kaj tradukis la E-verkisto **Miguel Fernández**. Pliajn informojn kaj mendojn ĉe la Libroservo de SATeH.

En la lastaj semajnoj aperis pluraj libroj de infana kaj junulara literatura sub la ŝildo de Eŭska Esperanto-Asocio. Ili estas la unuaj verkoj de la porinfana **Kolekto Lunlumo** kaj pri la porjunula **Kolekto Junularo**. La aŭtoro aŭ tradukisto de la




verkoj estas **Aitor Arana**, unu el la plej fruktodonaj verkistoj el Eŭskio, kiu profesie verkas eŭske. Al Esperanto li tradukis antaŭe la verkojn *Memoraĵoj de eŭska bovino* (1999) de Bernardo Atxaga kaj *La portreto de Dorian Gray* (2012) de Oscar Wilde. En nia lingvo legeblas nun lia porinfana *Klaŭda kaj la rivera sekreto* (2013), kaj nun la kortuŝa porjunula romano *Fajra amo*.

(HEF. "La Bitbulteno". N-ro. 15. 16/03/2015)

DONKIĤOTO EN ESPERANTO EN LA NACIA BIBLIOTEKO DE HISPANIO.

Komence de marto, Hispana Esperanto-Federacio donacis al la Nacia Biblioteko de Hispanio tri historiajn verkojn rilatajn al "Don Kiĥoto" kaj ĝia aŭtoro: du el la unuaj partaj tradukoj, entreprenitaj respektive de Frederic Pujulà kaj Julio Mangada, kaj unu eseeton eldonitan de la Madrida Esperanto-Grupo jam en 1915: *"Pri Cervantes kaj lia famkonata verko El Quijote"*.



Krome, ĝis la 3-a de majo oni povas viziti en la sidejo de la Nacia Biblioteko de Madrido ekspozicion pri kolektemo kun rilato al Cervantes: *"Coleccionismo cervantino en la BNE: del doctor Thebussem al fondo Sedó"*, inter kiuj eroj troviĝas vera juveleto: la manuskripto de la unua malneto de la traduko de "La malprudenta scivolulo", fare de Luis Hernández Lahuerta, kun liaj propraj desegnoj, kiun li donacis al la kolektemulo Juan Sedó.

Temas pri kelkaj el la unuaj programeroj de la publikaj kunmemoroj de la 400-a datreveno de la publikigo de la Dua Parto de la verko "Don Kiĥoto", kiu estos sekvata venontjare de la kunmemoro de la morto de ĝia aŭtoro Miguel Cervantes.

(HEF. "La Bitbulteno". N-ro. 15. 16/03/2015)

PRELEGO EN KLUBO DE AMIKOJ DE UNESKO DE MADRIDO.

La 17-an de marto, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, prelegis en la madrida Klubo de Amikoj de Unesko, CAUM, en la hispana. La titolo estis "Esperanto: nuntempo kaj estonto de internacia lingvo".

«BOLETÍN» LEGEBLAS EN LA RETO.

La lasta numero de nia gazeto "Boletín" jam pretas kaj espereble alvenos baldaŭ al via poŝtujo.

Dume, ĝi estas jam alirebla por membroj de la asocio en la interna areo de nia retejo: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/nepublika-zono/boletin>

Se vi ankoraŭ ne havas alirvorton, sendu mesaĝon al niaj retejestroj en: esperanto@esperanto.es.

Ĉiukaze, memoru ke ĉiuj numeroj de Boletín krom la kvar lastaj estas libere elŝuteblaj el nia Bitoteko. Sekvu la ligilon en:

<http://www.esperanto.es/hef/index.php/servoj/bulteno>

Dankon al la redaktoro, Ángel Arquillos, pro lia laboro.

(HEF. 23/03/2015)

LEGADO DE DON KIĤOTO.

Denove en la «Círculo de Bellas Artes», esperantistoj partoprenis en la seninterrompa legado de Donkiĥoto en Madrido, legante pecon en Esperanto. La dato estis la 23-a de aprilo, je la 20,30.

Temis pri tre bona horaro, tre baldaŭ post la solena komenco kaj antaŭ la novaĵoj.

ESPERANTO EN DONKIĤOTO PLURLINGVA.

Esperanto elektita inter la lingvoj en kiu aperis la projekto "Donkiĥoto plurlingva", organizita de la Urbestro de El Toboso (la urbo de Dulcinea, la amatino de Donkiĥoto). Ĉiu ĉapitro aperas manskribita en po unu lingvo. En la esperanta versio kunlaboris diversaj homoj, inklude de Antonio Marco Botella, prezidanto de Fondumo Esperanto, unu infanino dekjara, aŭ Emilio Gastón, la unua Aragona Defendanto de la Popolo post la reveno de la demokratio, nepo de konata esperantisto kunfondinto de la zaragoza grupo "Frateco".

En la oficiala prezentado en la Instituto Cervantes de Madrido partoprenis Alejandro Escobedo, prezidanto de la junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio.

("La Bitbulteno" de HEF. N-ro. 16. 21/04/2015)

HISPANA KONGRESO EN CULLERA (VALENCIA).

En la turisma urbo Cullera, proksime al Valencio, inter la 1-a kaj 3-a de majo. Eblas trarigardi la programon en la retejo de la Kongreso, ĉe la adreso: <http://esperantoval.org/cullera2015/>.

NOVAJ VORTOJ

Mojosa. Adjektivo (la origina kaj plej ofte renkontata formo de la radiko *mojos/*), kun signifo egala al tiu de la angla vorto “*cool*” en ties signifo de *bonega* aŭ *laŭ la sociaj normoj de la junularo*. Efektive temas pri mallongigo de triradika kunmetaĵo “modernjunstila”. Ĝi estas parto de la junulara esperanto-slango de la 2000-aj jaroj. La vorto jam aperis ankaŭ en novaj libraj vortaroj, sed ĝi ne estas parto de PIV.

Historio, deveno kaj signifo.

La vorto ekestis en novembro de 2003 dum la TEJK-seminario en Söjtör (Hungario) per iniciato de Gregor Hinker, Felix Zesch, Carl Mäsak kaj ceteraj seminarianoj, kiam oni konstatis la fortan mankon de esperanto-vorto kiu signifus la samon kiel la angla vorto “*cool*”, sed ne en la laŭvorta senco (*malvarmeta*), sed en alia (*moderna, bonega*). Malkiel multaj aliaj proponoj pri slangaĵoj, ĝi ekuziĝis kaj enradikiĝis, unue inter junuloj, sed intertempe ankaŭ pli kaj pli en la pli aĝaj generacioj.

La seminaria laborgrupo konstatis, ke la esenco de la angla vorto “*cool*” tradukeblas kiel *modernjunstila* (emfazante tiel al moderneco, juneco kaj stileco), sed ĉar tion oni konstatis tro komplika, tro longa kaj ne tro *cool*-a, oni anstataŭe prenis la komencajn literojn de ĉiu de la tri radikoj (*modern' - jun' - stil'*) kaj el ili kreis mallongigon *MJS*, kiu (laŭ sia po-litera elparolo) provizis bazon por la nova adjektivo *mojosa*.

Ekzistantaj klarigoj pri tio, kiel ne eblis iu *pli rekta* esperantigo de la vorto *cool* kialigas, ke fonetika transprenado “*kula*” kreus konfuzon kun kuloj kaj transprenado de la baza signifo *frida* ne taŭgas pro tio, ke ĝi kaŭzus dusensecon.

Derivaĵoj

Ĉar la vorto *mojosa* estas ĝenerale taksata kiel adjektivo derivita de radiko *mojos'*, oni foje renkontas ankaŭ aliajn derivaĵojn faritajn de tiu sama radiko - ekzemple *mojosega* (=ege *mojosa*), *mojosi* (=esti *mojosa*), *mojose* (=per *mojosa* maniero) aŭ *mojosulo* (=mojosa ulo). Tamen ilia uzo ne tiom oftas kiel la uzo de la originala vorto. En 2011 magazino *La Ondo de Esperanto* publikigis recenzon kun vorto *momososa* (modern-matematiksciencstila), kiu estas se ne rekta derivaĵo, do certe uzas similecon kun *mojosa*.

Ĝenerala uzo

Nuntempe la vorto *mojosa* (kaj sufiĉe malpli ofte ĝiaj derivaĵoj) trovas oftan uzon dum esperanto-konversacioj, precipe ene de la junulara medio. Male, multaj de la pli aĝaj esperantistoj neniam konatiĝis kun la signifo de tiu vorto. La reago kaj ĝia akcepto inter tiu ĉi grupo tamen ĝenerale estas milda, komprenema kaj multe pli pozitiva ol la reago al aliaj similaj eroj de la junulara slango (ekzemple la eksperimenta prepozicio *na*).

Oficialaj uzoj

- La kroata esperanto-renkontiĝo MIRO, kiu ĉiufoje transprenas alian signifon por la mallongigo en sia nomo, okazis en aŭgusto 2009 sub la nomo “Mojosa Internacia Renkontiĝo”.

- En majo 2009 la Itala Esperanto-Junularo unuafoje organizis aranĝon sub nomo "MJS - Montara Junulara Semajnfino" kies mallongigo estas aludo al la vorto "mojosa" respektive rekte la originalaj tri literoj el kiuj la vorto kreiĝis.
- En revuo "Esperanto" de marto 2011 aperis artikolo de José Antonio Vergara pri la kongresa temo de la tiujara Universala Kongreso de Esperanto organizota de UEA en Kopenhago, titolita "Mojose en Kopenhago! Kun la junularo, en ĝia Internacia Jaro...".
- Dum la solena malfermo de la 96-a UK en Kopenhago, la 24-an de julio 2011, Probal Dasgupta, la prezidanto de UEA, dufoje uzis la vorton "mojosa"; interalie en jena frazo: "Ni ĵus aŭskultis mojosan muzikan prezenton de la gejunuloj."

(El <http://eo.wikipedia.org>)

TRA LA MONDO ...

TEJO ricevis EU-subvencion de 20.000 eŭroj.

Iom neatendite, post kelkjara paŭzo, TEJO sukcesis ricevi grandan administran subvencion de EACEA, la Edukada, Aŭdvida kaj Kultura Ekzekutiva Agentejo de Eŭropa Unio. La subvencio por 2015 estas preskaŭ 20.000 eŭroj, kaj do havas gravan signifon por la buĝeto de TEJO.

Ankaŭ du aliaj petoj de EU-subvencioj faritaj de TEJO dum 2014 estis sukcesaj. Por la volontulo en Roterdamo oni ricevis 7.500 eŭrojn kadre de la EU-programo "Eŭropa Volontula Servo", kaj por trejnado de trejnistoj preskaŭ 60.000 eŭrojn kadre de la programo "Kunlaboro kaj novigoj por bonaj praktikoj".

Laŭ la prezidanto de TEJO, Łukasz Żebrowski, la sukceso pri tiuj du aliaj subvencioj kaj la atingoj de TEJO en eksteraj rilatoj supozeble grave kontribuis al la ricevo de la ĉi-jara administra subvencio.

La administra subvencio celas helpi la daŭripovan agadon de junularaj organizoj aktivaj en almenaŭ 12 el la programlandoj. La subtensumo estas decidata laŭ la nombro de oficistoj kaj statutaj renkontiĝoj, kiel estrarkunsidoj aŭ komitataj kunsidoj.

Preskaŭ samtempe kun la aljuĝo de la administra subvencio al TEJO la asocio ricevis plian bonan novaĵon, Łukasz Żebrowski rakontas:

– TEJO krome ricevis subvencion de la programo *Seed Funding* de la Norda-Suda Centro de la Konsilio de Eŭropo. La subvencio estas por projekto kiu ebligas al ni spertinterŝanĝon inter afrikaj kaj eŭropaj aktivuloj dum la IJK en Wiesbaden. Danke al ĝi al la IJK venos du gvidantoj de la junulara Esperanto-movado en Burundo kaj Kenjo. Tiu ĉi subvencio multe ŝuldas al nia strukturita, konstanta kaj altkvalita agado en eksteraj rilatoj. La subvencipeton mem kunkreis (alfabetorde): Sharifa Abas, Paulinka Kožuchová, Michael Boris Mandirola, Veronika Poór, Manuela Ronco, Mlossi Saidi, Tomasz Szymula kaj mi.

(*Libera Folio*. 29/03/2015)

Estraranoj de TEJO disdonos kondomojn.

La komitato de TEJO dum sia ĵusa kunveno en Germanio decidis, ke estraranoj de la asocio dum junularaj renkontiĝoj disdonu al ĉiuj TEJO-membroj "kondomojn en diversaj mezuroj kaj tipoj, kun slogano "TEJO protektas vin"". La prezidanto de la asocio ne ĉeestis la kunsidon, kiun gvidis la vicprezidanto, Michael Boris Mandirola, kaj la decido poste vekis iom da kritiko en la komitata retlisto.

La nekutiman proponon pri disdonado de kondomoj faris Germana E-Junularo kaj Nederlanda Esperanto-Junularo. La jena teksto estis aprobita post voĉdono:

"La komitato de TEJO, kunveninta Weißwasser, Germanujo, taskas al la estraro disponigi al ĉiaj TEJO-membroj, kiuj ĉeestas en Esperanta junulara renkontiĝo kun almenaŭ unu TEJO-estrarano, sufiĉajn kaj bonkvalitajn kondomojn en diversaj mezuroj kaj tipoj, kun slogano "TEJO protektas vin" aŭ io simila".

Ankoraŭ ne estis dissendita la protokolo de la kunsido, sed en la komitata retpoŝta diskutejo jam aperis la unuaj protestoj pri la decido. Inter la unuaj reagis Tobiasz Kubisiowski, reprezentanto de Pola Esperanto-Junularo.

– Mi ŝatus emfazi, ke daŭre mi kontraŭas la proponon (aŭ eĉ rezolucion, ĝi ja estis akceptita). Tial mi volus, ke ni aldonu al ĝi "se tio estus finance profita por TEJO aŭ almenaŭ ne monperda" aŭ entute nuligu ĝin. Kion pensas pri tio aliaj komitatanoj?

Albert Garrido el Filipinoj respondis, ke TEJO laŭ lia opinio ne elspezu eĉ unu eŭron por la kondoma projekto.

– Fakte, tia afero devus esti propra iniciato kaj respondeco de ĉiu paro, kiu dum TEJO-aranĝoj planas fari tion, en kio funkcias kondomoj, ne de nia Organizo!

Li aldonis, ke la decido ĝenerale ne estas akceptebla en ĉiuj kulturoj, kaj postulis retan voĉdonadon pri la afero.

Reagis ankaŭ Marek Blahuš, kiu deklaris sin kontenta, ke li ne plu estas komitatano de TEJO, ĉar li ne devas honti, kaj alvokis al nuligo de la kondoma decido:

– Se la celo estas alvoki atenton, tio kredeble funkcios – mi jam imagas la skandalan artikolon en *Libera Folio* – sed ĉu ne je la naŭziĝo de konsiderinda parto de la publiko kaj perdo de fido je TEJO ĉe alia ĝia parto (kiu tiel fine konvinkiĝos, ke la TEJO-agantoj vere ne plu interesiĝas pri la formortaĉinta grava parto de la E-movado kiu estas Pasporta Servo, ĉar ili ŝajne ne interesiĝas pri pli ol sia propra volupto). Grava parto de la ekstera fido (kaj mono) al TEJO estis ĉiam la TEJO-patronoj kaj aliaj movadanoj, kiuj vidis en TEJO la estontecon de la Esperanto-movado. Ĉu ili plu pagos siajn patronajn kotizojn konstatante, ke ili apenaŭ uziĝas por Esperanto-rilataj celoj?

La decido surprizis la prezidanton de TEJO, Łukasz Żebrowski, kiu mem ne povis partopreni la kunsidon.

– Malfacilas al mi esprimi opinion, ĉar mi ne ĉeestis la kunsidon kaj do same kiel aliaj neĉeestintaj komitatanoj, nun atendas pli detalajn informojn. Konante sole la decidojn alprenitajn mi ne vidas logikon subteni samtempe liveradon de kondomoj kaj tranĉadon de buĝeto. Ankaŭ mi ne scias ĉu oni traktis la interkulturan flankon de la afero. Certe mi bedaŭras ke jen aperas pliaj aferoj, kiuj estis traktitaj dum la kunsido malgraŭ ke ili ne estis en la tagordo, ne estis iel ajn antaŭanoncitaj kaj ŝajne estis neniu kialo por trakti tion en tiom malgranda eŭropeca grupo anstataŭ plenkomitate en la retlisto.

La komitatan kunsidon dum Junulara Esperanto-Semajno partoprenis 25 el la 46 komitatanoj de TEJO. La kunveno estis decidopova, ĉar ĉeestis pli ol triono el la komitatanoj. Tamen ĝiaj decidoj povas esti ŝanĝitaj per reta voĉdono.